FN PER ANC 47

n° 198 Decembro 1998

# ESPERANTO
# *NORMANDA BULTENO*

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 GRAND-QUEVILLY Tel.02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## RETROSPECTIVE

++++++++++

L'année 98 a été marquée en France par des évènements très positifs pour la cause de l'ESPERANTO.

Différentes manifestations ont remporté un grand succès. Chronologiquement, commençons par le congrès de SAT Amikaro qui a eu lieu à Quintin (22) durant le Week end de Pâques. Les 250 participants ont apprécié la bonne organisation, le site et l'ambiance. Même la neige,- rare en Bretagne à Pâques-, a empêché la dispersion des congressistes et a contribué au sérieux des débats.

D'autres rencontres ont eu lieu en Bretagne: les Cheminots dans les Côtes d'Armor, un congrès oecuménique rassemblant catholiques et protestants à Rezé, près de Nantes, et de nombreux stages en différents lieux..

Mais le grand évènement fut bien sur le 83ème Congrès Mondial à Montpellier. Ce fut un grand congrès, tant par la qualité de l'organisation que par le nombre inespéré de participants: 3200 de 66 pays. Ce fut une manifestation dont les espérantistes peuvent être fiers. Elle a eu un grand écho dans la région; le congrès était ouvert sur la ville : conférences, concerts, spectacles. Les espérantistes n'ont pas eu l'attitude de repli sectaire que certains voudraient leur coller. Il est regrettable cependant que les grands médias (et je pense surtout aux chaines de la Télévision française) ont failli à leur devoir d'information en ignorant un tel évènement. Il est regrettable aussi qu'un journaliste du MONDE ait commenté négativement le congrès alors qu'il n'y avait pas mis les pieds. Heureusement, devant l'afflux de réactions LE MONDE a rectifié le tir et a passé le 4 Novembre un article très positif d'une page entière : comme quoi il faut toujours réagir !

Un autre évènement important fut la fête organisée par UFE pour célébrer le centenaire du mouvement espérantiste en France. A l'occasion de cette fête, le chanteur Guy Béart vint apporter son soutien à l'Espéranto.

Mais l'action doit continuer en dehors des congrès. Signalons les démarches très positives organisées par JEFO (Jeunesses espérantistes) et par d'autres avec les dirigeants des organisations de jeunesse, des partis politiques, des syndicats, des associations culturelles etc....Le temps est fini où on croyait pouvoir faire progresser l'idée d'une langue internationale par le recrutement individuel, le bouche à oreille. Il faut maintenant convaincre les décideurs qui connaissent très mal notre affaire et qui ont des a-prioris, des préjugés. Grâce au développement du réseau Internet dans le milieu espérantiste, nous avons maintenant le moyen de réagir immédiatement aux coups qui nous sont portés:

Exemple: Le Premier Ministre a déclaré à Hong Kong devant des étudiants chinois : "Nous avons besoin d'une langue pour la communication universelle, et comme ce ne sera pas l'Espéranto, un langage que certains avaient voulu inventer à partir de toutes les langues, ce sera sans doute l'anglais..." Aussitôt connue, cette déclaration a provoqué de multiples protestations venues de monde entier à l'adresse du Premier Ministre, par voie Internet ou par voie postale.

Si l'année 98 nous a apporté des contentements, il faut aussi déplorer la fermeture de la Maison Culturelle Espérantiste de Grésillon. La Commission de sécurité a imposé des travaux que la situation financière de l'institution ne permet pas d'effectuer. Les responsables s'efforcent de trouver une solution pour empêcher la fermeture définitive.

En ce qui concerne l'Union des Espérantistes de Normandie, les problèmes évoqués lors de notre Assemblée Générale n'ont pas encore trouvé de solution. Il est de plus en plus nécessaire de rajeunir l'équipe dirigeante afin de créer le dynamisme indispensable pour faire progresser notre cause.

Lors de la réunion du bureau de l'association le 28 Novembre, nous avons décidé de profiter des élections au Parlement Européen en agissant auprès des candidats pour leur faire prendre position en faveur d'**une langue commune pour l'Europe.** Une langue commune et non pas une langue unique comme voudraient le faire croire les détracteurs de l'Espéranto. Nous aurons besoin de votre aide pour mener une action efficace

Ni deziras al ĉiuj legantoj de tiu bulteno Bonan Novan Jaron ! Ĝi alportu al vi kaj viaj familianoj multan feliĉon kaj bonan sanon

Petro KIJO

************************************************************************************************

## NIA BULTENO

La estraro de nia Unuiĝo decidis ke ekde la 1an de Januaro 1999, la abonkotizo estos plialtigata je 5 Frankoj.
**La Abonkotizo estas do 50 frankoj.**( Kompreneble por tiuj kiuj jam pagis, la malnova tarifo taŭgas.)
Membroj de grupoj kiuj jam pagas klubkotizon rajtas pagi reduktitan kotizon : 35 Frankoj kondiĉe ke tiu sumo estu sendata de la grupkasisto
**Ni sendas 165 ekzemplerojn.** El tiuj 27 al diversaj asocioj esperantistaj (interŝanĝo de bultenoj )
138 estas sendataj al individuoj **sed ni ricevis nur 69 kotizojn por 1998**
Ni do sendos alvokon al malnovaj membroj kiuj forgesis pagi sian abonon (25 personoj)
Alvokon ni ankaŭ sendos al novuloj kiuj profitis senpage la bultenon dum 1998.
**Atentu: tiuj kiuj ne respondos al nia alvoko estos forstrekitaj de nia listo kaj ne plu ricevos la bultenon**

Nia bulteno aperas 4 foje jare: Marte, junie, septembre kaj decembre
Ĝi estas ĉies afero : tio signifas ke ĉiuj rajtas verki artikoleton en esperanto kaj en franca lingvo. Artikoloj de komencantoj estos bonvenaj. Kompreneble se estos eraroj, ni korektos ilin. Evitu polemikajn temojn.
Nia bulteno ne havas literaturan pretendon; ĝi estas nur ligilo kiu celas amikigi samideanojn kiuj vivas en nia provinco. Ĝi havas la taskon informi vin pri esperantaj eventoj: kongresoj, staĝoj, aliĝoj al naciaj kaj internaciaj kongresoj, abonoj al valoraj revuoj kaj gazetoj.
Viaj kritikoj kaj sugestoj estos bonvenaj.

************************************************************************************************

## NIAJ GRUPOJ

**PRESSAGNY L'ORGUEILLEUX (27)**
Dank'al klopodoj de nia amiko Rémy LEBRUN, estis decidate nomi iun vojon de tiu vilaĝo: Voie Zamenhof.

**LES ANDELYS (27)**
Sylvie BONNET malfermis kurson kun 2 lernantinoj. Ĝi okazas ĉiumarde en Maison pour tous.
Sylvie esperas reaktivi grupon dum Januaro sed ŝi renkontas malfacilaĵojn.

**SAINT LO (50)**
Christian LEVESQUE kaj André MORIO kreis grupon en Saint Lo
Tio estas bona novaĵo por Sudnormandio ĉar delonge ni ne havis vivsignon de esperantistoj en Manche. La monata grupkunveno okazas dum la lasta sabato de la monato. La Prezidanto Morio malfermis kurson
Ni deziras sukceson por tiu klubo

**FECAMP (76):**
Nia amikino Jeannine LESUEUR revenis entuziasma de la UK en Montpellier. Post apero de artikolo en "Le Courrier Cauchois", ŝi sukcesis aperigi 2 paĝan artikolon en "Génération 3" monata bulteno de Fekampaj emeritoj
Okaze de la "salono de la pasioj de pensiuloj", la 2an de Oktobro, ŝi prezentis fotojn faritajn dum la Universala Kongreso kaj leterkovertojn en Esperanto, filatele afrankitajn. Nia Prezidanto Pottier helpis ŝin.

**YVETOT (76) :**
Gesinjoroj POTTIER foje iras al Jugoslavio pro familiaj kialoj. Efektive, la fratino de Pierre Pottier edziniĝis en 1956 kun Jugoslavo, Sro Zivko Ivanoviĉ el Serbio, kaj ili nun vivas en tiu lando, en la urbo Jagodina. Ĉi-jare, la 7an de Junio, okazis tie la edziniĝo de ilia filino, kiu ankaŭ flue parolas Esperanton kiel ŝiaj gepatroj, kun Sro Ralf Kemle, el Germanio, kiu bedaŭrinde ne parolas nian lingvon.
Post tiu festo, Gesinjoroj Pottier restis en Jagodina ĝis la fino de la monato kaj tiam eksciis, ke S-ro Ivanoviĉ, kiu jam delonge instruas Esperanton en sia urbo, tiam estis gvidanta kurson en la liceo, tute speciale al grupo da lernantoj, kiuj iom antaŭe preparis kaj ludis en diversaj urboj teatraĵon en la serba lingvo, kiu obtenis grandan sukceson kaj poste estis tradukita en Esperanton de Sro Ivanoviĉ kun titolo: *"Rekviemo por la perdintoj"*. Tiuj amatoraj aktoroj deziris ankaŭ ludi ĝin eksterlande kaj pro tio sekvis la Esperanto-kurson de Sro Ivanoviĉ en la liceo por povi prezenti tiun teatraĵon dum la Universala Kongreso en Montpellier. Sro Ivanoviĉ invitis siajn gebofratojn ĉeesti plurajn lecionojn de tiu kurso kaj paroligi la lernantojn.. Kiel antaŭvidite, la teatraĵo okazis en Montpellier, la 3an de Aŭgusto, kaj la sukceso estis tiel granda ke la aktoroj devis reludi ĝin 2 tagojn poste

P.POTTIER

**HEROUVILLE SAINT CLAIR (14)**
Prigeografia studentino preparas sian doktoriĝon per kompara enketo pri senhejmuloj en Francio, Italio, Britio. Ŝi jam renkontis 50 personojn en Caen sed ne havis kontaktojn por trovi socialan strukturon en Italio. Kiel sociala helpanto kaj esperantisto,Yves NICOLAS proponis rilatigi ŝin kun italaj delegitoj de UEA. Unu el Parmo tuj jese respondis. Dek tagoj sufiĉis de la unua kontakto ĝis la alveno en Parmo ! Isabelle atingis tiun italan urbon la 21an de oktobro por restado kvin semajna. La lokaj esperantistoj akceptis kaj gastigis ŝin, peris kun socialaj strukturoj kaj laboristoj. Ĉu Esperanto havos saman rolon por ŝia restado en Britio ?

HEROUVILLE ESPERANTO

**GRAND QUEVILLY (76)**
La grupo kunvenas ĉiusemajne (ĵaŭde ekde 17 h 45) en Centre Socioculturel. Partoprenas la kunvenon 15 personoj (inter ili estas 1 komencantino kiu restas 1 plian horon por studi). Ĉiu grupano elektas dikuttemon kiun li (aŭ ŝi) devas prezenti la sekvantan semajnon; tiu prezento povas okazigi debaton. Post gramatikaj korektoj, ĝi ankaŭ povas fariĝi artikolo por nia bulteno. Ekzemplo : en tiu ĉi bulteno, la artikolo pri la staĝo en Plouezek
Dum la kunveno, ni ankaŭ gramatikumas kaj progresigas nian lingvonivelon pere de tradukoj kaj komentoj de legaĵoj.
Kantoj kaj ludoj ĝojigas la etoson. Dum nia lasta grupkunveno, nia plej juna grupano (18-jara) preparis skrabloludon adaptitan por Esperanto.
En urba senpaga gazeto, Le SIGNAL ni povis facile aperigi artikolojn pri la vivo de nia grupo kaj pri Esperanto ĝenerale.
Okaze de Festo de Asocioj, en najbara urbeto, Grand Couronne, la 19an de Septembro, kelkaj aktivuloj de nia grupo starigis budon kie ili propagandis por nia lingvo; ili estis helpataj de yoga-grupo.
**********************************************************************************

***Alvoko al grupprezidantoj kaj Kursgvidantoj:***
*Ne forgesu sendi al mi la liston de viaj novaj membroj aŭ lernantoj se vi deziras ke ili ricevu nian Normandan Bultenon*

P.Quillaud

## ESTRAR-KUNVENO de U.N.E. kaj NORMANDA FEDERACIO en YVETOT la 27 an de Novembro 98

*****************************

Estis invititaj: la estraranoj de tiuj 2 asocioj kaj aliaj aktivuloj
Ĉeestis: P.Pottier, P.Quillaud, J.Gibaux, Y.Nicolas, S.Caron, M.Teani, Ph Freslon, Ch Millet
Senkulpigitaj: M.Touileb, Ch Levesque
Malfermo de la kunveno: je la 14 h 45

TAGORDO:
1- Reorganizo de U.N.E. kaj Normanda Federacio : Dum la lasta Ĝenerala Kunveno, en Hérouville, estis decidite ke Yves Nicolas skribos al aktivuloj de diversaj grupoj por inciti ilin kandidatiĝi al la komitato. Li kontaktis la diversajn grupojn tiucele dum oktobro kaj ricevis pozitivajn respondojn de pluraj personoj . Kelkaj aliaj diris ke ili ne estas facile disponeblaj pro sia aĝo aŭ pro aliaj okupoj en la movado aŭ en aliaj asocioj, ekstarigo de kurso en nova urbo ktp...Kelkaj ankoraŭ ne respondis. Nur 2 komitatkunvenoj jare sufiĉas ĉar la plej gravaj taskoj estas la loka agado kaj la grupa vivo. Ĉar la statutoj ne limigas la nombron de la komitatanoj, estus bone ke ĉiu grupo havu reprezentanton en la komitato.
Laŭ la respondoj ricevitaj ĝis nun , povus esti kandidatoj: Ge-Sroj: Nicolas (Hérouville), Lévesque (Manche), Morio ( Saint Lo), Le Prévost (Flers) se ŝi respondos pozitive, Caron (Le Havre), Gibaux (Le Havre), Quillaud (Grand Quevilly), Pottier (Yvetot), Touileb (Fécamp) se li respondos pozitive, Teani (Canteleu), Brachimont (reprezentanto de JEFO) . Kompreneble, ĉiuj aliaj kandidatoj estos bonvenaj.
2- Financoj: U.N.E.: 7640 FRF
Federacio: 4172 FRF (Tiu sumo estas uzota por aferoj rilataj al UFE)
Novaj abonkotizoj al UNE por 1999: 50 FRF (aŭ 35 FRF pere de grupkasisto). Tiuj kiuj jam pagis por 1999 ne devos kompletigi la kotizon.
3- Bulteno: Nun ĝi estas grandformata pro teknikaj kialoj
Unu bulteno kostas kun afranko 850 aŭ 900 Frankoj laŭ la nombro da paĝoj
165 bultenoj estas sendataj ( 138 al individuaj membroj kaj 27 al asocioj)
4- La listoj de kandidatoj estos naciaj. Yves Nicolas faros dosieron por ĉiu kandidato kaj montros ĝin dum la Ĝenerala Kunveno
5- Diversaĵoj: Novaj grupoj naskiĝis en departemento Manche kaj eble naskiĝos en Canteleu (76)
Marco Teani ŝatus renovigi la grupon en Rouen kaj ankaŭ informi la Verdanojn por Esperanto.
6- Venontaj kunvenoj: Komitatkunveno: **Dimanĉon la 14an de Marto** , matene. Ĝenerala Kunveno: la saman tagon, posttagmeze. La loko ne estas jam fiksita, sed eble situos en Departemento Manche

La Prezidanto
Pierre POTTIER

*******************************************************************************

## ESPERANTISTA EKUMENA KONGRESO

De la 25a ĝis la 31a de Julio 1998, okazis en Rezé apud Nantes la 13a Ekumena Kongreso, kiun partoprenis 80 esperantistoj (katolikoj kaj protestantoj) el 15 landoj. La kongreso elektis la urbon Nantes, ĉar oni festis la 400-datrevenon de la Edikto de Nantes, per kiu reĝo Henri IV donis la religian liberecon al la francaj protestantoj.

La kongreso pritraktis religiajn temojn kaj diskutis pri Toleremo, Repaciĝo, Libereco en tre amika kaj frata etoso.

La ĵurnalo Ouest-France raportis pri la kongreso en ĉiuj siaj eldonoj.

La venonta ekumena kongreso okazos en Gliwice ( Pollando ) la 7an de Aŭgusto 1999.

Albert BESSIERE (Rouen)

## NI STAĜIS EN PLOUËZEC (BRETONIO)

++++++++++++++++++++++

Pli ol 50 personoj partoprenis la Esperanto - renkontiĝon organizitan de Roger EON kaj lia grupo " Pluezek-Esperanto 22" de la 12a ĝis la 19a de Aŭgusto 1998

Inter la partoprenantoj alvenintaj de Francio kaj eksterlando, ĉeestis 2 personoj el la grupo de Grand Quevilly.

La kursoj estis faritaj de la simpatia Katalin Smideliuz, matene de la 9a ĝis la 12a horo por la komencantoj kaj posttagmeze de la 13a 30 ĝis la 16a 30 por la progresantoj

Aktiva kaj agrabla metodo kun simpla materialo plus demandoj-respondoj kun la instruistino aŭ kun la najbaroj produktis bonan laboron.

Evidente, oni konstatis ke la langoj pli flue parolis, ĉar la lastan tagon kelkaj el la studantoj teatrokostumitaj prezentis teatraĵeton antaŭ spektantoj kiuj serioze aŭskultis sed ridis kaj aplaŭdis bonhumore.

Kursoj, libertempoj sed ankaŭ aktivaĵoj proponitaj post la kursoj aŭ vespere multe plaĉis al partoprenantoj.

Tiel ni povis :

- viziti ostroparkojn ĉe la sablobordo de Port-Lazo. Estis la okazo por revizii vortliston pri la maro (algoj kaj konkaĵoj)
-admiri la laboron de renovigo de la ventmuelilo de Craca. Multe da klarigoj kaj demonstro de turniĝantaj aloj
- viziti la preĝejon de Lanloup ĉirkaŭata de tombejo
- ekvidi la preĝejon de Maria-an-Isquist kun ĝia fresko montranta la "skeletan dancon" kaj ekstere peronon sub porĉo de kie oni faris juĝon
- viziti templon de Lanleff, cirkla konstruaĵo, kies origino estas nekonata sed similas la Sanktan Sepulkron de Jeruzalem.
- viziti abatejon de de Beauport, poste la kapelon Sainte Barbe, ĝui la panoramon sub la golfeto de Paimpol de kie oni povas vidi la insulon Riou, la haveneton Pors-Even, la insulon Bréhat
- viziti la artiston Kito kies artaĵoj estas konataj: skulptaĵoj el ligno aŭ bluaj rulŝtonoj

Ĉi-tiu staĝo estis vigligita de vesperkunvenoj kun : Bretonaj dancoj, prelego pri Hindio (fotoj, kasedoj, kostumoj), ĥorgrupo, skrablo-ludo, lumbildoj pri Aŭstralio, teatraĵeton....

Dum la manĝoj, oni parolis pri disvolvado de la tagprogramo, pri la travivaĵoj de ĉiu, aŭ pri diversaj temoj. Vespere oni povis aŭskulti televido-elsendojn el Varsovio.

Do staĝo tre agrabla dank'al dinamismo kaj talento de Katalin, sen forgesi Sofinon, Petran kaj Kalman, kaj ankaŭ la laboron de la organizintoj kaj la bonan humoron de la partoprenintoj.

Venontjare, la sama staĝo okazos sub la gvidado de Atilio Orellana Rajas

Dominique LEROY (Rouen)

*****************************************************************************

**LE CONGRES INTERNATIONAL DES CHEMINOTS** (Internacia Fervojista Esperanto Federacio)

**aura lieu en Normandie** (presque) au MANS du 8 au 15 Mai 1999

Le post-congrès aura lieu (vraiment) en Normandie du 15 au 18 Mai dans le VVF de Colleville sur Mer

Il n'est pas nécessaire d'être Cheminot pour y participer . Tous les Normands seront les bienvenus. Programme très intéressant . Ambiance espérantiste garantie. De nombreuses excursions. Demandez le programme et le bulletin d'adhésion à : U.A.I.C.F. 7 rue du Château Landon 75010 Paris

Tél. 1 42 09 25 91

*****************************************************************************

**Le CONGRES MONDIAL de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA** aura lieu du 24 au 31 Juillet 1999

à Karlovy Vary en Tchéquie. Un autobus conduira les congressistes à Dresden, puis à Berlin pour participer au Congrès Universel. Bulletin d'adhésion chez: SAT 67 Av. Gambetta 75020 Paris

*****************************************************************************

**La 84-a UNIVERSALA KONGRESO** aura lieu à Berlin du 31 juillet au 7 août. Demandez le bulletin d'adhésion et la 1-a Bulteno chez: Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris

**La 54-a KONGRESO de SAT-AMIKARO** aura lieu à GLAY (Département Doubs) du 3 au 5 Avril (Pâques) Demandez le programme et le bulletin d'adhésion à Roland CUENOT 35 rue de Villers 25700 Valentigney . Tél. 03 81 34 64 46

*********************************************************************************************

## ABONU REVUOJN

Peradas por vi Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris jenajn abonojn: Dia Regno: 65, El Popola Ĉinio:192, Esperanto (por ne membro abonanto de UEA):200, Eventoj: 230, Franca Esperantisto (por ne aktivaj membroj de UFE): 200, Heroldo: 190, Kontakto (por ne Tejo membroj):120, Kulturaj Kajeroj: 80, La Domo: 120, La Kancerkliniko : 130, La Ondo de Esperanto (el Ruslando): 145, Literatura Foiro :170, Litova stelo: 72, Monato: 240, Rok'Gazet' 100
Tiuj prezoj estas en frankoj. Faru vian ĉekon je ordo de Esperanto-France CCP 855 35 D Paris

Autres Revues: Le Travailleur Espérantiste:100 F; pagu al FET 115 rue Beranger 92320 Chatillon, CCP FET 902 52 F Paris
SAT Amikaro:160 F; pagu al SAT Amikaro 67 Av Gambetta 75020 Paris CCP 37 852 90 L Paris
Sennaciulo (por NE-membroj) 336F Pagu al P.Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly CCP:SAT-peranto 17 333 10 N Paris

*********************************************************************************************

**ADHÉSIONS:** Si vous désirez adhérer aux organisations nationales et mondiales (ce que nous vous conseillons) UEA, UFE, SAT ,SAT-Amikaro, JEFO, TEJO, FET...,demandez à P.Quillaud un bulletin d'adhésion

*********************************************************************************************

## BABELO !

Freŝdata aĉeto de altprema purigilo (kärcher), provizas al mi temon por artikoleto en nia N.B. Apertinte la aparatskatolon, mi ĝojis ekvidante la dikecon de la informilo kiu troviĝis ene, ĉar mi ja bezonis detalajn klarigojn pri la uzado de tiu aparato tute nova por mi. Sed ve ! La broŝurdikeco fontis ne de la granda nombro da klarigoj, sed de ĝia 19-lingveco ! Mi do legis la francan tekston, foje malbone redaktita aŭ tradukita de la germana, kun multaj ortografaj aŭ lingvaj eraroj. Gi estis ege supraĵa kaj tute ne sufiĉis por senspertulo kiel mi. Krom tio, oni ankaŭ povas fari jenajn rimarkojn :

1)- La angla teksto aperas dufoje, unue por Angloj, poste por Usonanoj; la diferencoj inter ambaŭ tekstoj estas maloftegaj, kaj precipe koncernas la stilon kaj deziron, en la usona versio, pri pliaj detaloj.

2)- La portugala teksto ankaŭ aperas dufoje, sed unu prave sub la titolo "portugala", la alia sub la titolo "hispana"!

3)- la priskribo en la greka de 2 tre malsamaj organoj kaj ties funkciado, estas ekzakte la sama, kiam en la aliaj lingvoj prave respondas malsamaj tekstoj

4)- konsciaj verŝajne pri siaj lingvaj mankoj, la broŝurrespondeculoj surogatas la tekston per bildoj ne ĉiam kompreneblaj

5)- sed la plej frapa afero estas la ekzisto de gravaj diferencoj rilate la enhavo, laŭ la lingvoj: ekzemple , en la franca parto oni parolas ie pri iu "raccord" (niplo) sen pliaj klarigoj; ankaŭ la anglolingvanoj devas kontentiĝi kun la nipleco de tiu organo; sed la hispanoj rajtas scii ke temas pri "niplo por la akvopreno". Tiaj diferencoj estas oftaj en la lingvoj kiujn mi povis almenaŭ supraĵe kontroli. Miaopinie, tradukisto devas nur fidele traduki; ne estas lia rolo korekti stilerarojn, ripari mankojn, aldoni, klarigi malprecizaĵojn

Oni povas diri laŭ la devizoj de la iam famaj televidaj "shadoks":
"Pourquoi faire simple quand on peut faire compliqué ?"

Henri ROUSSEAU (Caen)

*********************************************************************************************

**ESPERANTO-info** est un bulletin d'information tout en français; c'est un bulletin très bien fait, avec une bonne présentation. Abonnez vous et abonnez vos amis non espérantistes
Abonnement 4 numéros : 40 F . Chèque à l'ordre de ESPERANTO-info CCP Marseille 11 901 46 B à envoyer à ESPERANTO-info Hortensias 2, 121 bis Bd Napoléon III 06200 Nice